



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA

DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16

SONETO

**el Lupercio Leonardo de Argensola
(1559-1613)**

Terura figuraĵo de la morto,
Ne plu ŝancelu min, ho song' kruela!
Per fortranĉ' de premligo la ĉiela,
Konsolo nur por mia vea sorto.

Elserĉu pri tirana ŝirma korto,
Pri jaspa mur' aŭ pri plafon' juvela,
Avarulon dum dorm' en lito ĉela
Elveku ŝvitotreme via forto.

Vidu tiran' tumulton de popolo,
Dum ĝi disbatas liajn pordojn ferajn,
Murdiston kun ponard' al lia kolo

Kaj avarul' siajn riĉaĵojn terajn
Forrabi kun insult' aŭ sen parolo,
Sed ne prenu de l'Am' la ĝuojn verajn.

VICENTE INGLADA.

INFINITIVO ANSTATAŬ PARTICIPO

En "Hispana Esperanto-gazeto" kaj en "Kataluna Esperantisto" aperis antaŭ nelonge tre interesa artikolo de S-ro Samuel Roca Rodó, sub la titolo "Pri infinitivo kaj participo". Ĉar kelkaj lernantoj de mia supera kurso de Esperanto sin turnis al mi, petante klarigon pri dubaj punktoj de tiu artikolo, mi kredis interese publikigi en "Nia Vivo" kelkajn rimarkojn pri tia gramatika demando en la celo eviti, ke iaj gramatikaj eraroj povu disvastiĝi inter la novaj Esperantistoj.

Laŭ la dirita artikolo ŝajnas, ke al S-ro ne plaĉas la uzado de infinitivo kun akuzativo post alia verbo, kiel ekzemple en la frazo "mi vidis lin kuri". Tiu ĉi frazo havas nur unu senco: plej klare difinitan kaj estas uzita de plej bonaj aŭtoroj, inter kiuj D-ro Zamenhof kaj ankaŭ kutime en multaj eŭropaj lingvoj (hispana, kataluna, franca, angla, germana, k. c.). Tiel, do, ĝi ne estas, kiel S-ro Roca kredas "nelogikaĵo kaj imitaĵo aŭ ko-

pio de nacilingva esprimo" sed internaciismo, kiun Esperanto rajtas proprigi al si, kaj estas jam definitive akirita de nia lingvo internacia.

Ekzemploj: hispane: *dejemos pasar el tiempo*; france: *laissons le vent gémir et le flot murmurer* (Lamartine); germane: *Ich sehe ihn kommen* (mi vidas lin veni), *Ich höre ihn sprechen* (mi aŭdas lin paroli); itale: *lo vedo partir* (mi vidas lin deiri); en angla lingvo la uzado de *lasi* kun infinitivo estas tiel plaĉa, ke la imperativon oni formas per verbo *lasi*. Tiel, do, anstataŭ diri: *ni foriru*, oni diras: *lasu nin foriri*, k. c.

El la konstato ke "mi vidis lin kuri" signifas pli-malpli same ol: "mi vidis lin kuranta" (aŭ kurantan), S-ro Roca konkludas, ke *kuri* = *kuranta*. Kompreneble tiu ĉi konkludo estas erara. Laŭ sama rezonado, ĉar *ago skribi* kaj *ago skriba* havas pli-malpli saman signifon, oni povus konkludi ke *skribi* = *skriba*, kio estas absurda egalajo.

Imitante tiun malveran rezonadon, ni povus diri, ke ĉar la du aritmetikaj operacioj: $2 + 10 = 12$ kaj $2 \times 6 = 12$ havas identan rezultaton kaj komunan unuan elementon 2, la dua devas esti identa, tiel, do, $10 = 6$. La absurdeco de la rezultato montras, ke la rezonado estas malvera.

Poste S-ro Roca daŭrigas: Infinitivo estas kvazaŭe verba substantivo kaj esprimas abstraktan ideon dum participo estas ĉu adjektivo, ĉu verbo kaj ĉiam esprimas konkretan ideon. Oni ne povas akcepti jenajn egalecojn:

$$\begin{aligned} &\text{abstrakta ideo} = \text{konkreta ideo} \\ \text{substantivo} &= \left\{ \begin{array}{l} \text{adjektivo} \\ \text{verbo} \end{array} \right\} = \text{participo} \end{aligned}$$

Oni ne povas imagi al si pli erarajn konsiderojn. Unue la abstrakteco aŭ konkretateco de vorto dependas de la signifo de la radikoj, ne de la gramatika rolo de la vorto, kiun oni eltiras de la radikoj. Ekzemple, la participo *amanto* (kiu estas substantivo, malgraŭ ke S-ro Roca asertas malprave ke la participo estas ĉu adjektivo, ĉu verbo), estas tiel konkreta kiel la substantivo *infano*, ĉar ni povas tute same diri: *la amanto estas blonda* kaj *la infano estas blonda*. *Belo* estas abstrakta kaj *belajo*,

konkreta, malgraŭ ke ambaŭ estas substantivoj tiritaj el sama radiko *bel'*. Rilate abstraktecon aŭ konkretecon *skribadi* kaj *skribado* estas samspecaj, malgraŭ ke la unua estas verbo kaj la dua substantivo. El la du substantivoj: *ŝtono* kaj *scienco*, la unua estas konkreta, la dua abstrakta k. t. p.

La aserto, ke participo estas ĉu adjektivo, ĉu verbo estas malĝusta. Participo estas komplekso, kiu devenas de verbo kaj tial esprimas agon aŭ staton (kiel la verbo) kaj plie: la tempon (estantan, estantan aŭ estontan) kaj aktivecon aŭ pasivecon, t. e. ĉu la ago estas farata aŭ ricevata *de iu aŭ io*.

Ni pritraktu ekz. la estantan aktivan participon, sed nia rezonado estas ĝenerala kaj aplikebla al la formoj *-ant*, *-int*, *-ont*, *-at*, *-it* kaj *-ot*. Ekz. *amant'* esprimas: 1) agon ami, 2) ke oni faras ĝin (aktivo) kaj, 3) en estanta tempo. Ĉion tion ĉi esprimas ĉiam *amant'*: por tiri el ĝi vorton estas necese scii ĝian gramatikan rolon. Se ni algluas finaĵon *-o*, ni ricevas substantivon: *amanto* = tiu, kiu amas, ekz. *la amanto estas juna*. Se oni algluas finaĵon *-a*, oni formas adjektivon: *la amanta virino* = la virino, kiu amas. Fine per finaĵo *-e* oni havas la adverbon: *amante* - kiel amanto.

La procedo eltiri el *amant'* la vortojn *amanto*, *amanta* kaj *amante* estas tute sama, kiel por ricevi el *am'*; *amo*, *ama* kaj *ame*. La diferenco estas, ke tiuj ĉi lastaj vortoj nur montras la agon ami, kiun esprimas ilia radiko *am'*, dum la participaj formoj: *amanto*, *amanta* kaj *amante*, esprimas ke la ago estas farata (aktivo) kaj en estanta tempo, ĉar tia estas la signifo de la komplekso *amant'*.

Oni povus ankaŭ eltiri la verban formon: *amanti* = esti amanta, sed ĝi ne ŝajnas necesa kaj la Esperantistoj ne uzas ĝin, nek la proponitajn formojn: *li amantas* = li estas amanta, *laŭdatu* = estu laŭdata, kaj cetere.

Tiel, do, participo povas esti uzata, laŭ sia rolo gramatika, kiel substantivo, adjektivo aŭ adverbo. La dua egalajo de S-ro Roca, estas tute nekomprenebla.

Proponante la ekzemplon: "*mi vidis bati la infanojn*" S-ro Roca ne insistas pri tio, ke la dusenceco nur dependas de tio, ke la verbo *bati* estas transitiva, kaj tial la infanoj povas *bati* aŭ *esti batataj*. Sed se oni diras: *mi vidis la infanojn kuri*, la senco nur povas esti: *kurantaj* ĉar *kurataj* ne ekzistas. Se ni nun diras: "*mi vidis la infanojn bati la hundon*" la senco estas plej klara: *ke la infanoj batas la hundon*.

(Daŭrigota).

Opinioj pri "Sango kaj Sablo"

El «Nia Gazeto».

SANGO KAJ SABLO, romano de *Vicente Blasco Ibañez*, el la hispana tradukis *Ramon de Salas Bonal*. 232 paĝoj, formato 22 × 16 cm. sub arte ilustrita, kvarkolora kovrilo. Prezo: 9'50 pesetoj = 19 frfk. (Eldonis *Aragona Esperanto-Federacio*, 1935. Havebla ĉe la tradukinto Ramón de Salas, Cervantes 5, *Zaragoza*. Hispanujo kaj ankaŭ ĉe "Nia Gazeto").

Ĉi tiu verko de la alttalenta hispana verkisto Blasco Ibañez estas jam fama en la tuta mondo. Ĝi estas tradukita en multajn lingvojn kaj ĉie vekis kompreneblajn intereson kaj ŝaton. Intereson, ĉar en

ĝi la aŭtoro priskribas hispanajn morojn tre tipajn, nome la hispanan specialaĵon: la taŭrajn ludbatalojn. Ŝaton ĉar Blasco Ibañez havis mirindan povon elvoki per siaj romanoj ne nur la ĝeneralan atmosferon de la studataj medioj, sed ankaŭ la psikologian verŝajnecon de la personoj, ĉefaj aŭ flankaj, kiujn li igas mirakle vivaj, sed ankaŭ la specialan fizionomion de la homamasoj, ĝiajn subitajn entuziasmojn, ĝiajn ne malpli abruptajn elreviĝojn kaj kolerojn. La pure priskriba parto de liaj verkoj estas ne malpli atentinda ol la ceteraj, precipe kiam ili pentras, per larĝaj penik-ektuŝoj, vastan bildon pri la vivo, la amuziĝoj, la penado aŭ la luktoj de l'popolo.

... ..

Pri la romano mi ne skribos plue. Pri la traduko mi kun plezuro konstatas, ke ĝi estas entute bona Unuflanke, s-ro Ramon de Salas sukcesis konservi la "koloron" de la originalo, kvankam li penis traduki, cetere tre lerte kaj trafe, la terminojn proprajn al la taŭra batalarto: ili ja estas, se ne internaciaj, almenaŭ de multaj konataj, kaj ilian tradukon aŭ klarigon oni povus doni en aparta listeto: "matadoro" ja sonas pli hispane kaj *taŭre* ol "spadulo", kaj krome ne ĉiu spadulo estas matadoro: ekzemple, skermĉampiono aŭ franca akademiano estas spadulo, tamen ĝis nun oni vidis nek unu nek la alian faligi mortantaj virbovojn sur la sangan sablon de areno. Tiun rimarkigon mi faris ne, ĉar la tradukinto konservis ne tradukita la vorton "toreadoro", sed tial ke mi trovas troigita la serĉadon pri internacia komprenebleco, kiu foje senbezone senkolorigas, platigas tradukajojn. Aliflanke la lingvo uzita de la tradukinto prezentas minimumon da malglataĵoj. Tial estas neutile la kelkajn rimarkitajn montri tra lupeo.

Pro ĉio ĉi-supre dirita, mi konsilas senrezerve la legadon de tiu pasiige interesa verko.—GEORGES AVRIL.

STRANGA INSULMONDO

Romantika veturo tra la svedaj ŝeroj

Unu el la plej impresaj kaj plej strangaj pejzaĝoj de Svedujo estas la ŝera marbordo, tiu teritorio, en kiu batalas akvo kontraŭ lando pro la superrego, kaj miloj da insuloj, grandaj kaj malgrandaj, altaj kaj malaltaj borderas la marbordon, kiel larĝa zono. Lumfajroj kaj marsignoj montras al la alvenanta ŝipo la danĝerojn, kiuj minacas ĝin. Jam malproksime sur ŝajne ankoraŭ vasta maro sennombraj malprofundaĵoj kuŝas dense sub la supraĵo, kaj estas nur rimarkeblaj per la ŝaŭmado de la ondofrapado.

Nur iom pli malproksime de la ekstera marbordo la rokoj leviĝas el la maro, kiel malaltaj rifoj, glatigitaj de la ondegoj. Sur la rifoj amasoj de mevoj kaj urioj donas sian rendevuon. Ju pli multe oni penetras en la masoj de la insularoj, des pli alte superstaras la rokaj insuloj. Maldensa vegetaĵaro montriĝas, kaj ŝirmate de ventoŝirita arbo tie kaj tie sur soleco de insuleto staras unu el tiaj lignaj dometoj, tipa por tuta Skandinavujo, kiel antaŭposteno de homa loĝejo.

Pli kaj pli multe la insuloj proksimiĝas unu al la alia; densa koniferarbaro borderas la bordojn.

Arboj elradikigitaj de la vento, sekaj branĉoj, juniperarbustoj kaj rokoblokoj formas nepenetreblan densejon. Muskaj kovraĵoj etendas sin sur la nuda roko; pli malproksime en interna lando, kie ekzistas sufiĉe dika tavolo de tero, altaj mirtelarbustetoj kovras la teron. Se oni trairas inter ili (marŝante inter ili), ili estas altaj ĝis la genuoj, ĉar la abundeco de la beroj estas nepriskribebla. Neniu homo deŝiras ilin, nur la malmultaj birdoj, kiuj vivadas en ĉi tiu soleco, ilin serĉas, kiel nutraĵo.

Admirinda estas la perspektivo, kiun oni ĝuas de sur la altaĵo de ŝero. Profunde malsupre estas la arĝenta maro, kaj sur ĝi naĝas—kiel folioj de nimfeoj sur lageto—la malhelaj solecaj insuloj. Neniu moviĝas en la arbaro, insektoj zumas en la herbo, kaj de malproksime sonas la voko de sovaĝa kolombo.

Strangaj estas ankaŭ la homoj, kiuj vivadas en ĉi tia ĉirkaŭejo: vortŝparemaj kaj timetemaj, sed treege gastamaj ili malfermas sian domon al la fremdulo kaj regalas lin per ĉio, kion povas doni la simpla hejmo. La gastiganto montras sin dankema pro tio, ke oni rakontas al li la novaĵojn el la mondo, kiu estas malproksima de la senbrua domo

ELNJO SCHÜTT.

ARTAJ PAĜOJ

Ludoviko Morales, el «Divino» (la «Dia»)

La verkoj de la artistoj naskas diversajn opiniojn ĉe siajn kritikistojn.

Ĉi tiuj ĉiuspecaj kriterioj pro la diverseco de la biografiistoj, kiuj foje konsistigas ja legion, nin enigis en konfuzan maron, se ni ne rigardus ankaŭ per niaj propraj okuloj, por povi havi propran prijuĝon, la mirindajn kreitaĵojn, kiuj vivas eterne dank' al tiaj estintaj geniuloj Ekz:

Iu biografiisto diras, ke Perugino falas en la unufirmecon, kreante siajn figurojn tro delikate. Ili estas delikataj, tre delikataj, sed malvarme neesprimaj.

Alia vidas ĉe tiu neesprimeco la serenajn majestecon, kiu laŭ tio, kion oni diras, apartenas privilegie al la diuloj.

Vere la figuroj idealigitaj per la peniko de Vanucci ne alprenis la tragediajn sintenojn preskaŭ brutaj, kiuj estas ĉe la pentraĵoj de Caravaggio, nek la dolorajn mienojn videblajn en la verkaro de Roquier van der Weyden.

Per tiuj diversaj vidpunktoj la biografiistoj povas diri, kion ili volas. Ĉu estas akcepteble kredi, ke ili foje povas erare prijuĝi? Nedubehle.

Pri Perugino oni ne povas nei lian mirindan kolorigadon kaj eĉ malpli la ravigan kapablecon por prezenti ĉiam la perfektan virinan belecon. Oni diros eble, ke Perugino tro multe idealigis siajn kreitaĵojn. Nu, des pli bone! Akceptebla estas tiu malgrava rimarko, se ĝi ne estus dirita, kiel riproĉo. Ĉio, kion idealigas spirito sincera kaj revema, estas plejofte perfekta kaj altvalora.

Oni nun diru: Ĉu ne efektive estis tia la spirito de la pentristo naskiĝinta en Perusa?

La verkaro de Ludoviko Morales ne ricevis tiajn aŭ similajn interdiskutojn. Ĉiuj liaj biografiistoj diras same: ke ĝi estas milda kaj ke Morales neniam variis sian pentrmanieron. Oni diras, ke pro

tio mem la reĝo Filipo II ne sentis admiron al lia talento. Oni akceptu, se oni volas, tiun supozon, kiel vera.

Sed laŭŝajne ne multe priokupis nian artiston la juĝo, kiun pri liaj mistikaj inspiroj havis la filo de Karolo I.

Reĝo povas pli-malpli trafe scii gvidi siajn regnantojn laŭ prospera kaj progressa vojo, sed rilate arton, se li ne sentas ĝin, ĉu estas atentinda la reĝa opinio?

(Daŭrigota).

Epizodoj el la pasinteco

Antaŭ kelkaj jaroj la tuta loĝantaro de Aŭstralio ekscitiĝis, kiam oni konstatis, ke kelkaj virinoj, kies ŝipo rompiĝis, estis kaptitaj de la indiĝenoj en Arnheim lando; la registaro elspezis grandan kvanton en malfrua kaj malvigla provo por savi ilin. Estas nun certe, ke iu lerta indiĝeno elpensis la tutan rakontaĉon. Estis, tamen, grava realeco la sorto de la virino, kiu estis kaptita de la Gippslandaj indiĝenoj, en la jaro 1839.

Fruaj, ĵurnalaj rakontoj estis tre konfliktaj kaj oni ne sciis klare, ĉu la malfeliĉa virino estis iu liberigita el la ŝipo "Britannia" rompita de la maro; nome fraŭlino McPherson, kiun oni kredis savita el la sama ŝipo, aŭ sinjorino Capel, kiu sukcesis atingi la marbordon, kiam la ŝipo "Britannia" rompiĝis apud la "Ninety Mile Beach". Estas eble, ke ambaŭ virinojn atingis sama terura sorto, sed la fakto, ke la koncernanta estis fraŭlino McPherson, ŝajnas esti certigita per la malkaŝigo de arbo tranĉskribita kun ŝia nomo, la nomo de la ŝipo kaj kelkaj klarigoj, per kiuj ŝi esperis, ke oni povus sekvi ŝin kaj savi ŝin.

Ŝi estis portata al la montaro ĉe indiĝenan ĉefulon kaj naskis kvar infanetojn, tri el ĉi tiuj mortis. Kelkfoje paŝistoj vidis ŝin, sed neniam la indiĝenoj permesis, ke al ŝi alproksimiĝu blankulo. La fakto, ke la kaptitino naskis infaneton baldaŭ depost sia malapero en la arbaro kaj, ke oni trovis blankuleton en la arbaro plifortigis la kredon, ke la sinjorino Capel, same, kiel fraŭlino McPherson havis la saman teruran sorton. La loĝantaro petegis, ke la registaro faru ion por ilia savo, kaj en 1846 serĉantaro konsistanta el kvin blankaj policistoj, ok indiĝenaj policistoj kaj nigra bubo forlasis Eagle Point. Ili atakis kelkajn indiĝenarojn, sed ĉiufoje la virindiĝenoj forkuris en la arbaron kaj oni ne povis scii multe pri la indiĝeninoj kaj infanoj.

Tutage ili rimarkis la literon "E" freŝe tranĉskribita sur arbo, ŝajne per konkio, kaj poste ili certigis, pri tio ke la virino estis en la proksimaĵo dum multaj tagoj: ŝi ne povis sciigi sian ĉeeston al la serĉantoj, ĉar la indiĝenoj minacis ŝin per mortigo, kiam ŝi provis tion fari. La serĉantoj havis unu bataleton kun la indiĝenoj, kiuj ĉeestis grandnombre. Unu el la indiĝenoj ĵetis sagon, kiu trapasis la ĉemizon de policisto. Kelkaj indiĝenoj estis pafvunditaj, antaŭ ol ili forkuris. Post kelkaj tagoj la serĉantaro revenis. Pri la manko de sukceso oni kulpigis la malbonan ekipaĵon kaj la ĵaluzon ekzistantan inter ambaŭ estroj de la serĉantoj. Privata serĉantaro komencis la serĉon kelkajn monatojn pli malfrue. Ĝi estis estrata de eks-policisto Mr. J. De Villies, kiu estis sperta arba-

risto. En la serĉantaro estis, krom la estro, kvar blankuloj kaj dek indiĝenoj. Ĉi tiu estis pli sukcesa, ol la antaŭa. Ili sukcesis sendi leteron al la kaptitino, sed kiam ŝi komencis skribi respondon, la ĉefulo indiĝena Bunjaleena alvenis en tiu momento, forprenis la kraĵon kaj batis ŝin per bastonego. La 10-an de Februaro De Villies revenis al Melburno pro manko da manĝaĵoj. La 29-an de Oktobro oni trovis la kadavrojn de blankulino kaj infano kvar mejlojn for de la domo de Komisiulo Tyler. La maniero de ilia morto estis klarigata de la indiĝenoj, kiuj deklaris, ke plifortulo forprenis la virinon de Bunjaleena, kiu, kiam li malkaŝis sian perdon, murdis ŝin.

ALBERT G. GILLIGAN.

Victoria (Aŭstralio).

« N I A G A Z E T O »

Ĉi tiu esperanto-gazeto, eldonata en Francujo, kies formato estas 43'5 × 31'5 centimetra, konsistas el multaj paĝoj ilustritaj per belaj fotografioj kaj estas redaktata de profesiaj gazetistoj nome: Georges Avril, S. Grenkamp-Kornfeld, Julio Baghy ktp., kies nomoj estas ja tre multe konataj en Esperantujo kaj garantias la bonstilon kaj altan intereson de la enhavo.

La abonejo en Hispanujo por ĉi tiu tre grava, ĉiumonata gazeto estas "Aragona Esperanto-Federacio" — strato Roda 10, Zaragoza —, do ĉiuj hispanoj dezirantaj ĝin aboni faru la abonpeton pere de ĝi.

Jarabono por hispanoj: 6'45 pesetoj, sendokostoj enkalkulita.

V O L O

Estas opinio de ĉiuj, ke tio plej grava en la vivo estas "ĉierni vivi", tio estas, la memeduko kaj ĝiaj diversaj branĉoj". Ni kredas, ke la ĉefaj bazoj de tiu ĉi konata, antikva scienco estas: volo, persisto, memoro, memrego aŭ malvarma sango, optimismo k. t. p.

Volo estas moviga forto, kiu animas nian korpon, kaj estas nia propra vivo, la tuta vivo koncentrita en la imperativo de la verbo "voli". Por atingi la volon estas necese unue "modero" kaj due "persisteco". Ni ne sukcesos regi niajn pasiojn, se ankoraŭ ni ne povas venki niajn simplajn malplenumojn aŭ mankojn de edukiteco. Kroma afero estas "mi tion faru nun" anstataŭ "morgaŭ". Kiam ni estas farontaj ion ni ne prokrastu ĝin.

Destinante bone la tempon kaj farante la aferojn ĉiam ĝustatempe, ni pruvos, ke ni havas volon. Posedante ĉi tiun, persistemon kaj karakterforton, ni povos ekdiri la vorton—akso de la vivo—"antaŭen". Per volo ni sukcesos venki maldiligentecon kaj embarason fizitan kaj intelektan kaj tio ĉi ja estos sufiĉa. Kun ĝi ne estos plu pesimistoj tiuj, kiuj ĉion vidas nigra, kvankam ĝi estas blanka aŭ senkolora aŭ travidebla. Oni povas certigi, ke el cent pesimistoj estas naŭdek kvin sen volo, kaj la restantaj ĝin havas nur duone; do tiu, kiu ĝin havas forpelas la malfacilaĵojn proprajn al lia ekzisto kaj venkos, sukcesos.

Superregi sian volon estas reguligi la produktadon kaj la elspezon de la aktiveco, reanimi la vi-

von, kiam ĝi estingiĝas, kaj moderigi la flamon, kiam ĝi reviviĝas. Neniu kontraŭstaros tiun, kiu posedas fortan volon! Ĝi antaŭvidas, studas; se ĝi dubas, ĝi konsultas, kaj, kiam ĝi konsiliĝis kaj konsciiĝis pri tio, kion ĝi celas, tiam ĝi elektas ion kaj faras tion; tiaspeca estas, kiu havas volon. Nekonscio estas ĝia kontraŭa malamiko.

Do, junuloj, fariĝu volfortuloj.

Laŭ Frederiko Wose Berdaguer.

Esperantigis

M. C. B.

A N E K D O T O J

Iu persa generalo, adresis al Lizandro, macedonestro, tiun ĉi mallongan kaj minacan skribon: "Se mi venkeniros Grekujon, ĉion mi buĉigos kaj forbruligos". Lisandro plej kviete respondis al li per la jeno, kiu estas ja modelo por lakonisma korespondado: *Se*.

* * *

"Se mi ekpensus, diris Hoche, ke mia ĉapo povas koni miajn planojn, mi ĵetus ĝin en fajron". (De Bonnechose, L. Hoche).

* * *

Oni demandis Diogenon, je kioma horo oni devas tagmanĝi. "Se vi estas riĉa, respondis li, tagmanĝu, kiam vi volos; se malriĉa, kiam vi povos." (Diogeno el Laerto).

* * *

Oni venis iam sciigi Budéon, kiu laboradis en sia kabineto, ke en lia domo estas brulado. Li respondis daŭrigante sian laboron: "Volu tion transsciigi al mia edzino, ĉar mi ne min okupas pri aferoj de mastrumado".

* * *

S-rino Montmorin diradis al sia filo: "Vi tuj eniros en la mondon; nur unu konsilon: enamiĝu pri ĉiuj virinoj".

* * *

Montmaur estis iam manĝanta kun multaj amikoj, kiuj laŭte parolis, kriis kaj kantis samtempe. "Nu! miaj amikoj, diris li sprite, bonvolu silenti, se plaĉas, ĉar oni ne scias, kion oni manĝas".

S P R I T A Ĵ O J

—Post mi venas monstro.

—...?

—Ĝi estas filino mia.

—...?

—... Monstro de ĉarmo kaj ĝentileco.

* * *

Oni diris al riĉa bankiero, kiu estas malsana:

—Laŭŝajne vi multe fidas al la kuracistoj.

—Tio estas certa! La kuracistoj, kiuj flegas min, estus stultaj, se ili ne penus por konservi klienton, kiel mi.

* * *

Ekzameno pri religio:

—Kiomaj estas la malamikoj de la homoj?

—La malamikoj de l'homoj estas tri.

—Kiu estas ili?

—La fraŭlinoj, la vidvinoj kaj la sinjorinoj.